



BOLETIN

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

NOVIEMBRE
1950
RUZAFÁ, 7
VALENCIA
(ESPAÑA)

¡POR EL IDIOMA, AL CORAZON!

La fuerza propagandística del Esperanto no es debida al derroche del reclamo en prensa ni radio. No se debe tampoco al recurso rimbombante de la charanga ni al desfile multicolor, como en otros países se hace hasta para difundir las cosas más serias.

Si el Esperanto se desarrolla satisfactoriamente en nuestro país, a pesar de la penuria económica que nos impide recurrir al artificio del anuncio costoso, es porque lleva en sí la gran fuerza expansiva del convencimiento, de la lógica y de su imprescindible necesidad. Todo el mundo comprende que el fin que se persigue con el Esperanto es noble, útil y realizable. Tan solo los menguados, carentes de ideal y de perspicacia, pueden calificarnos de ilusos y de utópicos; una corta conversación entre esperantistas de distintas nacionalidades basta para apearles de su error y convencerles de que «eso» sirve para algo práctico y no es una fantasía.

¡Cuántos escépticos cambiarían de criterio si tuviesen ocasión de poder presenciar el maravilloso espectáculo de un congreso esperantista universal! Hasta una simple conversación en un centro esperantista cualquiera, con profusa y espontánea argumentación, basta para demostrar al más reacto, que el Esperanto es una solución práctica del problema lingüístico. Pero lo que más fácilmente convence a los escépticos es el éxito rotundo que actualmente se aprecia en el aspecto docente,

Todos saben que, en cursos para idiomas, escasamente un cinco por ciento de los alumnos que empiezan logran terminar el curso satisfactoriamente; en los cursos de Esperanto, es frecuente observar que todos los que empezaron el curso lo terminan con provecho porque la tarea es altamente sugestiva, y el principiante comprende que su leve esfuerzo no es valdío, ya que rápidamente va adquiriendo el suficiente dominio del idioma. Tres meses de fácil estudio le dan un dominio que, para otro idioma, requeriría tres largos años, y con menos garantías de recuerdo de la materia aprendida. Y después de un breve curso, en el que no se ha tropezado con los escollos habituales en otros idiomas, el estudiante de Esperanto se siente capacitado para comprender lo que oye, escribir lo que desea y «pensar» en Esperanto lo que tiene que expresar. Después de tan breve aprendizaje, el nuevo esperantista se convierte, por su propia experiencia, en un fervoroso propagandista de «su querido idioma», cuya posesión le enorgullece, no tan solo porque le permite ampliar extraordinariamente los límites de su ambiente cultural, sino por que gracias a él se siente miembro de una comunidad de hombres que, a través de las fronteras, pueden hablarse de corazón a corazón, por medio de este idioma genial que fué creado para que, junto con el propio de cada pueblo o nación, todos los hombres del mundo puedan entenderse.

La internacia lingvo Esperanto, per la simetrio de sia bela strukturo, konvena por la scienco, kapabla por la poezio, utila por la arto kaj plene oportuna por la ordinara vivo, estas nun plej serioza garantio de progreso kaj emblemo de klara optimismo en la grava momento, kiam la mondo
● ● baraktas en konfuzo pro manko de konkordo! ● ●

POR LA HISTORIO DE LA ESPERANTAJ VORTOJ

II - La hispanismo MARCIPANO

La hispana Toledo, mirinda ĉefurbo, estis dum la 15^a jc. sidejo de araboj, judoj kaj kristanoj. Tie ekzistis belegaj moskeoj, ravaj sinagogoj, kelkaj el ili ankoraŭ admireblaj, kaj pompaj kristanaj preĝejoj; tie oni parolis sendistinge arabe, hebree kaj kastile; tie kunvivis amike ekde la jaro 712, kiam Tariko konkeris la urbon, la kristanoj, denove regantoj pro la rekonkero de Alfonso la 6^a en 1085; la judoj, kiuj komercis, pruntis, ŝanĝis kaj kreditumis, kaj la araboj, domkonstruistoj, terkulturistoj kaj vendistoj de la produktoj el la kamparo.

Dum tiu 15^a jc. Toledo estis duonkortego: la reĝoj kastiliaj loĝis tie oft; tiea ĉefepiskopo vivis majeste en grandioza palaco, kaj la kanonikaro vivis kiel princoj; Anekino, majstro de pentristoj kaj skulptistoj en la konstruado de la finonta katedralo, ĝuis kaj triumfis impone. Tiam, Johano la 2.^a eliris el tie, por batali la andaluzanojn, kaj revenis kun abundaj trofeoj kaj riĉaj militakiraĵoj, kiujn oni almetis tie; tiam subskribiĝis solene la paco inter Aragono kaj Navaro; tiam Elizabeto, la populara Katolika Reĝino, naskis tie belan princon; tiam inaŭguriĝis la impone imprensanta katedralo kaj komenciĝis ceremonie la admirinda konstruaĵo de Sankta Johano de la Reĝoj... Ĉio ĉi tio motivigis festojn, festenojn, bankedojn, regalojn; la mono fluis abunde...

En tiu tempo, profitema, industriema kaj frandema arabo elpensis la bongustegan marcipanon. La historio, kiu konservas tiom da datoj senvaloraj kaj eĉ stultaj, ne alnotis tian okazaĵon interesan kaj plej agrablan por ĉies palatoj.

La marcipano de Toledo estis, kaj estas ankoraŭ, incite alloga pasto; ĝi fariĝis, kaj fariĝas ankoraŭ, per la plej dolĉaj, elseligitaj migdaloj kaj per bonega sukero elportita de Granado; ĝia formo estas kuriozaj figuroj: leonoj, kiel tiuj de la Alhambro, serpentoj enruligitaj; sed, speciale kaj unue, reĝoj sidantaj, kiel la antikva blazonŝildo de la urbo, tre adekvata bildo por la oficialaj sinjoregoj ĝin mangontaj.

La bruiga sukceso de la marcipano vekis skandalojn; ĉar ĉiuj volis manĝi ĝin kaj komerci per ĝi. La apotekistoj postulis kaj atingis la monopolon vendi la marcipanon, ĉar ili havis reĝan privilegion por

vendi la substancojn delikatajn, kaj nenio pli delikata ol la marcipano; sekve, dum jaroj ili ĝuis la ekskluzivon. Kristanoj kaj judoj demandis al la araboj, kiel nomigas tio; kaj ili respondis: «maŭza-ban», kio signifas «reĝo sida», kiel efektive estis ĝia formo. La kristanoj donis similonan nomon al la pasto, en kastila lingvo: **marzapán**, poste, **mazapan** kaj tiel ĝi disvastiĝis en Hispanio. La komercaj ŝipoj sendis ĝin al Ĉipro, kaj de tie al Venecio, kie la italoj lerte lernis fabriki ĝin, sub la nomo **marzapane**. Iom post iom, la marcipano, disvastigita de hispanoj kaj italoj, estis konata ĉie, kaj ankaŭ ĉie alnomata per la hispanismo. La angloj nomis ĝin **marchpane** aŭ **marzipan**; danoj kaj svedoj, **marsipan**; la francoj, **massepain**; la germanoj, **marzipan**; portugaloj **marçapao**; pole kaj ruse, **marçapan**, ke. Plej baldaŭ la Ameriko hispane parolanta gustumis kaj diris **mazapan**; kaj Meksio, ekz. fabrikas ĝin bonege. Zamenhof, homo raffinita, kiu trakuris Eŭropon, sendube gustumis la riĉan paston, kaj kiel detalema lingvisto, li ankaŭ devis koni la devenon kaj historion de la vorto; tial, plenkonscie li enkondukis en sian vortaron la hispanismon **marcipano**.

AZOR

ĈU NI BONE PROPAGANDAS?

Tufoje, samideano el Valencio skribis al la Vatikana Radio, kaj li ricevis respondon, ke la redaktoroj de tiu radiostacio scias nenion pri nia lingvo nek pri nia Movado, ĉar ili tute ne ricevas esperantajn gazetojn.

Ni, esperantistoj, atendas naive propagandon ĉe la ĉefaj radiostacioj aŭ multenombredon eldonitaj ĵurnaloj, sed ni ne disdonas novaĵojn aŭ sciigojn pri niaj aferoj al la koncernaj redaktistoj. Nepe ni devas fini tiun malbonan agmanieron. Ni devas klopodi precipe, ke estu esperantistoj en la plej gravaj centroj de la propagando. Ni devas bombardi per nia materialo ĉiujn taŭgajn oficejojn. Certe, la plej efika propagando nia estas nia gazetaro. La legantoj povos kalkuli pri granda nombro da esperantistoj en la mondo, nur rigardante niajn gazetojn. Niaj paroloj povus esti vanaj, sed rigardado al nia gazetaro estas elokventa pruvo de nia disvastiĝo. Pro tio ni diras al la eldonantoj de niaj gazetoj: Bombardu per la papero de niaj presajoj ĉiujn oficejojn de la radiostacioj, ĉiujn redaktejojn de la plej gravaj ĵurnaloj de la mondo; estu ili kvazaŭ abonantoj, kaj tiel —se Dio volas— ni sukcesos!

JOSE GUZMAN (Valencio)

XII CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO EN TARRASA (Barcelona)

Nuestros amigos de aquella ciudad se preparan ya, con gran entusiasmo, para la más perfecta organización de esta gran reunión nacional de los esperantistas españoles que, previa autorización, naturalmente, de la Superioridad, tendrá lugar el próximo verano.

A la mayor brevedad anunciaremos la fecha exacta de su celebración, así como la dirección y lista de componentes del Comité Organizador. Sin embargo, podemos hoy anticipar que se estudia y prepara un interesante programa de tres días, donde se procurará armonizar, a través de diversos actos, el trabajo práctico (asambleas, comisiones, ponencias, etc., etc.), con los más variados recreos y amenas distracciones (veladas teatrales, sesiones literarias, visitas, excursiones, etc.) que harán inolvidables, a todos los asistentes, estas primeras jornadas públicas del actual esperantismo hispano. Se espera contar con la valiosa ayuda y cooperación de todas las entidades culturales y, sobre todo, con el alto patronato del Excmo. Ayuntamiento de Tarrasa, Siendo así pues que por parte de los organizadores se pondrá el máximo empeño en lograr toda clase de ventajas, para facilitar el viaje y la estancia al mayor número posible de samideanos de toda España, debemos nosotros corresponder ya, desde ahora, como obligación moral, con nuestro afán más vehemente para que, a finales de Julio o primeros de Agosto de 1951, sea realidad el esperanzador lema:

¡Todos a Tarrasa para fundirnos en el grato ambiente del XII Congreso Español de Esperanto!

SIGNO: TRI RUĜAJ ROZOJ

Originala rakonto de TIM SCHWED, tradukita de Karl Michalichka

Ferdinando tuj mallevis la gazeton, kiam la juna knabino envagoniĝis. Dio, kiel ĉarma estis la junulino! Sur la tritikoblon-daj buĉoj gaje sidis ĉapeleto, tiel aŭdaĉe surmetita, ke ĝi plej ĝuste efikis. Ŝi havis malhelbluajn okulojn, ĉarman vizagon kaj akre ŝminkitan allogan buŝeton. Kaj la figuro? Ho, eĉ la kostumo estis eleganta! Per unu vorto, ŝi estis, knabino laŭ deziro.

Ferdinando deziris nun alproksimiĝi al la belulino. Li provis ĉiel veki ŝian atenton, sed pli vere — kiel nun ĉiuj knabinoj en la tramo — ŝi sin okupadas nur je sia mansaketo. Ferdinando, kiel vulturo, serĉis okazon por alparoli la ĉarman virineton. Kompreneble, ŝi rimarkis lin jam de longe; sed ŝi kokete hezitis, ĝis fine ŝi decidis aljeti al li rigardon. Malrapide, li alserpentumis al ŝi; sed ĉe tio li forĝesis, ke veturanta tramo havas siajn malicojn, ĉar en tiu momento li staris iomete malfirma sur siaj piedoj, kiam la tramo traveturis akutan kurbigon. Kaj, antaŭ ol li povis firme stari, li puŝis per sia kubuto vitrotabulon. La kristalo krakis kaj la vitropecoj falis teren; kelkaj virinaj voĉoj ekkriegis, viro malbenis, la konduktoro venis tra la veturilo kaj Ferdinando, per unu salto, estis jam sur la strato kaj malaperis malantaŭ proksima angulo.

Ferdinando restis do tre ĉagrenita, ĉar

estas dolorige konstati, ke aventuro finiĝas antaŭ ol ĝi komenciĝis. Sekvantan tagon, ĉagrenite li sidis en kafejo; kaj tute senpense li foliumis gazeton. Nu, jen kio troviĝis tie en la anoncoparto:

«Tiu interesa juna viro, kiu hieraŭ, en la tramo, linio A, ĉe la provo alproksimiĝi malbonsancis, estas invitata al renkonto:

Tegetthoffa monumento, je la sepa.

Signo: Tri ruĝaj rozoj».

La koro de Ferdinando gojkrisis. Ĉu je la sepa? Ankorau do li havas tempon! Jen, rapide hejmen por surmeti la plej bonan veston kaj eĉ pli rapide prizorgi tri belajn ruĝajn rozojn kaj bombonujon. Kaj poste, per rapidega paŝo, li iris al la monumento, antaŭ kies soklo jam okazis aliaj centmil romantikaj rendevuoj.

Ŝi ankorau ne estis ĉi tie. Sed du tramistoj gentile alpaŝis lin. Unu el ili kviete ridis dum la alia prezentis du fakturojn: kvindek ŝilingojn por rompita kristalo, dudekok ŝilingojn kaj kvindek groŝojn por anonco. Ferdinando rigardis ilin ambaŭ, ankorau neniam li vidis tiel grandegajn tramistojn. Li jetegis la rozojn sur la povi-mon kaj eltiris la monujon...

Sed unu aferon tre bone li konas: alia anonco neniam venigos lin al rendevuo!

Ankoraŭ la pejzaĝo, en la kadro de la aŭtuno, konservas iom da ŝparitaj koloro kaj varmo; sed malmultaj folioj restas jam en la branĉoj por ludi, tra la vasta scenejo el aero, la lastajn mimikojn en adiaŭa baletoj... La tero bezonas nun la fermenton de velkanta materio por transformi ĝin denove, interne de sia sino, dum la paŭzo de la vintro, en kvanton da nutro kaj suko por la vegetaĵoj, sen kiuj ĉiu cetera vivo neniel estus ebla. Nenio en la naturo okazas hazarde, sed perfekte kaj saĝe; kvankam la homoj, tro vante aŭ eĉ tro malice-naive, komprenante, ke oni dormas por akiri per ripozo freŝajn fortojn, ne ŝatas tamen nek volas kompreni, ke la morto de apartaj estaĵoj estas necesa premiso por la generala vivo. Same kiel oni tre ofte ignoras sendanke, ke sindonaj personoj oferas sian sanon, per streĉa laboro aŭ intensa studado, por la sano de korpo kaj menso de aliaj personoj... Ne amara melankolio nek influo de Novembro, pro la pia rememoro al mortintoj, malhele vualas miajn pensojn, sed la plena konscio, ke oni ne taŭge profitas el la morto por la vivo, kiel la tero scias profiti de la vintro por taŭga ornamo de l' printempo kaj somero.

Kaj, predikante laŭ ekzemplo, mi profitas la okazon, ke inspiro ne jukas hodiaŭ ĉe mi, por ŝanĝi la babilon en utilan aferon: ordigi la gazetojn, kiuj en dika staplo kuŝas antaŭ mi atendante oportunan recenziĝon, kio sen plia fordistra preparo, nek plia banala enkonduko, jen tiel komenciĝas:

En Japanio, nia lingvo floras kaj progresas; kun LA REVUO ORIENTA, kiu aperigas fragmenton el la tradukita kaj eldonita ĉapitro de «Don-Kihoto», por ekzerco de traduko, venas eskorto de du aliaj malpli gravaj, sed viglaj revuetoj: NOVA FRONTO de Japania Esperantista Asocio kaj LA VERDA URBO de Sendai Esperanto-Klubo, kun tre bona scienca artikolo «Konfuzo de Japania Lingvo» kaj bela kortuŝa rakonto el verko de 14-jara orfo, nomata Nakamura Sizuo, kiun oni zorgas en katolika orfejo. POPOLA MONDO estas la oficiala organo de Ŝanhaja

Esperantista Ligo, kies enhavo plejparte aperas laŭ la kurioza skribo de la ĉinaj ideografiaĵoj. De Aŭstralio venas, kun sia kutima bonhumoro, LA RONDO kies malgranda formato ne malhelpas taŭgan aranĝon de la teksto. En kroniko pri la landa movado, oni respondas al kelkaj riproĉoj per trafaj vortoj, kiuj ankaŭ utilas verŝajne por multaj naciaj asocioj: «Ĉies kritiko estas bonvena por la bono de nia movado, sed anstataŭ teorie proponi «reklamajn kampanjojn» kun ne ekzistanta mono, oni komencu hejme per starigo de kursoj por komencantoj kaj per plialtigo de la ĉeestantoj en la semajna grupvespero». NEW ZEALAND ESPERANTIST, ankaŭ kun eta formato, estas kvazaŭ trilateralbirdeto el la paradiza insulo de Nova Zelando, kie fine de Decembro okazos la landa Kongreso, al kiu mi adresas jam ĝojajn salutojn. Kaj nun, ek' vi venu kun mi, per imago, al la nova kontinento! AMERIKA ESPERANTISTO per speciala suplemento raportas amplekse pri la 40^a Kongreso de EANA, kiu -laŭ propraj vortoj- «estis harmonia, almenaŭ kelkfoje, ĉar eble malharmoniaj partoj eĉ helpis klarigi la situacion kaj la metodojn de nia Asocio» BRAZILA ESPERANTISTO estas multpaĝa gazeto, kiu respegulas la favoron. kiun ĝuas nia lingvo en la ĉarma lando de plej viglaj dancoj. Oni montras la bildon de la bronza busto de D-ro Zamenhof, farita de konata brazila skulptisto por la monumento, kiu estos starigata en Belo Horizonte, sur la Placo Esperanto; ĝi estos la unua monumento, je honoro de nia majstro, en Ameriko. De Montevideo, ĉefurbo de Urugvajo, venas VOĈO ESPERANTISTA kun informo pri la sukceso de Urugvajna Esperanto-Societo ĉe la nacia Ekspozicio pri la Infanoj, ĵus okazinta en Montevideo; niaj tieaj samideanoj prezentis elegantan standon, kiun aranĝis kaj planis ĝia aktiva prezidanto S-ro Fernández Menéndez. BULTENO de Argentina Esperanto-Ligo ne haltas en la nobla tasko diskonigi la veron de nia idealo tra la vasta lando, kiu estas kvazaŭ daŭrigo de la propra Hispanio; en la front-

INTER LA PROZO DE LA ESPERANTISTO

artikolo oni povas legi: «Sed malgraŭ ĉio, ni sentas plej intime de niaj koroj, ke ni estas sur la ĝusta vojo, kaj ke ni devas daŭrigi nian batalon, eĉ se ankoraŭ multaj jaroj devas pasi antaŭ ol atingi la finan venkon». Antaŭen, do, amikoj, sur komuna vojo! NIA FLAMETO, organo de la Rosaria Klubo, estas specimeno pri modela Klubgazeto; inter elektita enhavo, trafu konkordas seriozece kaj distro. Kaj nun, jen fine jam en la malnova kaj ĉiam elstara Eŭropo, varia kaj diversa. SVENSKA ESPERANTO - TIDNINGEN prezentas frontpaĝe, en funebra borderaĝo, la portreteton de la ĵus mortinta sveda reĝo Gustavo, la 5^a, kiu, laŭ rektaj vortoj el la gazeto mem, akiris la estimon kaj amon de la tuta sveda popolo. En interna paĝo, en artikolo kun iom ironiaj, kaj tamen gravaj, komentoj pri freŝaj novaĝoj, la aŭtoro diras, ke ofte li revis pri esperanta telegrafoficejo, kaj tamen... «tia oficejo tute ne ekzistas en nia movado, kaj la «novaĝoj» en nia gazetaro estas, el ĵurnalista vidpunkto, proksimume tiel aĝaj, kiel Matuzaleno». NORVEGA ESPERANTISTO danke mencias mian rubrikon, okaze de aludo, kiun mi faris al la simpatia organo de la tieaj samideanoj. La serioza enhavo, kun abundaj raportoj pri la aktiveco de la diversaj kluboj, atentis pri la bona grundo, kiu tie ekzistas. DANK - ESPERANTO BLAD prezentas bonegan raporton, kun tre belaj fotoj, pri la Arkeologia Tendaro por esperantistaj studentoj en Aggersborg; bedaŭrinde, la rigoro de la spaco malpermesas al mi pli larĝajn klarigojn. SEK, la membrogazeto de Studenta Esperanto-Klubo en Kopenhago, kun hele kaj bele ŝmin-kita vizaĝo, ŝvingas siajn paĝojn laŭ tipa studenta maniero, ĉar neniu jemoj kaj projektoj estas pezaj aŭ tedaj, sed la suko de la enhavo plej serioze eligas tiun ĉarman aromon, kiun nur la juneco inteligente gaja povas kaj scias oferi. NIA VOĈO tute regule aperas kaj vizitas nin kiel organo de Dana Laborista Esp. Asocio. LA VIVO, organo de «Amikoj de la Homaranismo» post daŭra silento, pro malsa-

no de S-ino Veenendaal, ŝvingas denove kuraĝajn paperajn foliojn, al kiuj la verda preso havigas aspekton de standardaj faldaĝoj. Lerta kompilo de multaj leteroj, kun plej diversa enhavo, konsistigas ordigitan tuton, kiu estas speco de gvida principo por idealoj el kies materialo fariĝis la lulilo de Esperanto. Sciŭ la sindona redaktorino, ke plej sincere mi deziras al ŝi kompletan resaniĝon. NEDERLANDA ESPERANTISTO prezentas fronte belan bildon de la kurso por ĝeinstruistoj ĉe Popola Altlernejo, laŭ la rekta metodo, gvidata mem de S-ro Andreo Ĉe, la celo de tiu promesplena kurso estas varbi sufiĉan nombron da ĝeinstruistoj, pretaj profiti la favoran ŝancon, ke nova loĝo pri elementa instruado ebligos la instruon de nia lingvo en unuagrada lernejoj. LA PROGRESANTO, tiu valora studfolio, ĉiufoje pli interesa, rajtas duoblan gratulon pro la agrabla sciigo, ke la kompetenta redaktoro k-do Degenkamp jam estas ekster danĝero, post la grava operacio, kiun plej urĝe li devis suferi. Sciŭ la bona amiko, ke tuj, kiam pri tio mi eksciis, vikle mi kapriolis per facilaj saltoj, pro neeltenebla ĝojo. ESPERO KATOLIKA, sur la plaĉa ebena de sia treege bonkvalita papero, aperigas ne nur plej interesajn specifajn artikolojn, kiel tiu sub titolo: «La katolika laborista junularo kaj ĝiaj esencaj karakteroj», sed ankaŭ dankinde ĝi kontribuas al la komuna prilingva laboro per bonega komentario de F. Winkel, kie estas skribite: «ni parte samopinias kun D-ro Manders, ke nia movado sendube suferas pro troa mastrumado gramatikista kaj literaturista». Vere, la katolikaj samideanoj meritas ĉies laŭdojn. INTERSTENA INFORMILO, sub la devizo: «amikigo, reciproka klerigo!» celas: «la disvastigon de vere praktika tutmonda mallonga skribo, kiu taŭgas por ĉiuj skriblaboroj de ĉiu homo kaj ĉiu lingvo». Bone estu do en niaj vicoj la tasko ŝpari tempon kaj spacon en la skribaĉo.

Sed... ho, ho! rigardante la kompaktan blokon de mia ĵus bakita «torto» preskaŭ mi hontas antaŭ miaj propraj vortoj de laŭdo al mallonga skribo... Mi fidis tamen je via indulgemo, ĉar jam en la fluo de ekstrema fervoro, nur por vin komplezi, dronas en ebrio de propra entuziasmo

LA LEGEMA KOBOLDETO

TA GAZETARO

FACETAS DEL MOVIMIENTO ESPERANTISTA

● **ALEMANIA.**—En Bad Nauheim se ha descubierto una lápida conmemorativa de la estancia, en 1907, del Doctor Zamenhof en dicha estación balnearia. Con dicho motivo tuvo lugar un acto de homenaje al creador del idioma auxiliar internacional.

En la Escuela de Urbanismo de Munich, donde el Esperanto se ha admitido en el cuadro de idiomas, el 90 por 100 de los estudiantes han escogido cursar este idioma.

● **AUSTRIA.**—La organización juvenil de la Cruz Roja ha empezado a propagar el Esperanto entre sus miembros y ha organizado un curso para maestros en Innsbruck, a fin de contar con suficiente personal docente para una campaña eficiente.

● **ESTADOS UNIDOS.**—«Américas», órgano oficial de la Unión Panamericana, publica en su edición española de Junio un extenso y documentado artículo, del diplomado Brasileño Sr. Correa, titulado «Babel moderna», en el cual se exponen las tremendas complicaciones lingüísticas en las reuniones internacionales y los onerosos métodos usados para remediarlas. El autor llega a la conclusión de que solamente una lengua internacional, lógica y sencilla como el Esperanto, puede resolver el babélico problema.

El señor Alfonso Correa, miembro brasileño de la Organización de Estados Americanos, fué uno de los concurrentes a la entrega de la «Esperanto-Petskribo» en las oficinas de la ONU, acto que fué ampliamente mencionado en nuestro número de Septiembre.

● **FRANCIA.**—La «Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj», constituida el año pasado en el Congreso de Bournemouth, ya cuenta con cinco asociaciones miembros en Francia, Inglaterra, Alemania, Holanda y Suiza. Se calcula existan unos 1.200 maestros esperantistas en los 18 países donde hay representantes de esta organización.

Durante el Congreso de París celebró su primera reunión internacional, habiendo recibido un mensaje de salutación del director de la Sección de Educación de UNESCO, señor Lionel Elvin. Nuestra influencia ya se deja sentir en centros tan importantes.

● **HOLANDA.**—El Ministerio de Instrucción, Arte y Ciencias, estudia la modificación de la Ley de Enseñanza a fin de establecer, como asignatura facultativa, dentro del plan de estudios, la enseñanza del Esperanto a todos los escolares holandeses. Siendo deseo unánime de todos los esperantistas la realización de tan trascendental medida.

En las Escuelas municipales de Dordrecht y Zwijndrecht se enseña ya nuestro idioma a todos los escolares concurrentes con gran aprovechamiento.

● **INGLATERRA.**—Durante el pasado año se ha enseñado el Esperanto en 22 centros de educación, con asistencia de 1.542 estudiantes, con lo que se está transformando Inglaterra en uno de los países donde existe mayor ambiente esperantista.

● **ITALIA.**—El Doctor G. Canuto, de Parma (Ospedale Maggiore) ha sido nombrado Presidente provisional para la restauración de «Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio», según acuerdo tomado oportunamente durante el Congreso de París.

La restauración de TEKA impulsará nuevamente el desarrollo del Esperanto entre la clase médica, donde tanto arraigo tiene el idioma auxiliar, como vehículo de sus intercambios científicos internacionales sin dificultades lingüísticas.

● **SUIZA.**—La asociación «Die Naturfreunde» publica en su periódico un curso del idioma auxiliar para difundirlo entre sus miembros y excursionistas en general.

● **JAPON.**—El Ministerio de Instrucción ha asignado una subvención de 60.000 yens para los estudios de Esperantología en 1950. Tres de los trabajos premiados han sido: «Pri la ideo de internacia lingvo en Japanujo», de Cunetaro Fugima; «Pri la ideo de la ebleco de esprimoj en artefaritaj lingvoj», de Mijake-Soliej; y «Studo pri la formo de verboj», de Kenji Ossaka. Allí el Esperanto goza de tanto prestigio como cualquier idioma europeo.

ULTIMAS NOTICIAS SOBRE LAS EMISIONES ESPERANTISTAS DE RADIO ROMA

Esta importante Estación, tan popular entre el público esperantista, ha perfeccionado todavía más sus emisiones en Esperanto, los viernes y los domingos de 6 a 6'20 de la tarde (hora española) en ondas de 19,5 y 31,1. En esta misma emisión esperantista han comenzado los comentarios radíofónicos de la Divina Comedia, invitándose a todos los radioescuchas a tomar parte en la sección titulada «La leterkesto» (El buzón) con preguntas y respuestas acerca de Dante Alighieri. Recomendamos a todos nuestros lectores, que tengan aparatos receptores, no se pierdan el placer de escuchar ninguna de estas magníficas emisiones, que prueban el auge del Esperanto en el terreno de la radiodifusión.

JAUME GRAU CASAS MORTIS!

Subita koratako forprenis de ni unu el la plej eminentaj pioniroj kulturantaj la esperantan literaturon. S-ro Jaime Grau Casas mortis la 8.^o de Novembro 1950. en Valencio, kie li nun loĝis de antaŭ unu jaro. Li naskiĝis en Barcelono la 2.^o de Decembro 1896. Tie mem, en la kataluna ĉefurbo, li esperantistiĝis, kiam li apenaŭ estis 18-jara. La amo al la literaturo tuj manifestiĝis ĉe li, kaj sub la influo de sia pli aĝa frato Josep, sperta kaj rimarkinda pro siaj esp. tradukaĵoj, li alten loĝiĝis en la beletra kampo. Kvar jarojn post sia konvertiĝo, li atingis la Naturan Floron ĉe la Int. Floraj Ludoj de KEF-Kongreso en Maillou. De tiu momento, lia poetika temperamento plene elverŝiĝis en la esperantan literaturon kaj donos al li honoran lokon, apud la plej eminentaj poetoj. Liaj versaĵoj estas diversloke aperigitaj, sed la plej elstarajn li kolektis en tri broŝurojn: **Amaj Poemoj** (1924); **Novaj Amaj Poemoj** (1927) kaj **La Lasta Poemo** (1936). Tamen, la plej reliefa kaj valora verko, kiun li lasas en nia Movado, estas la **Kataluna Antologio** (1925), kiu vere estis konsiderata, en tiu epoko, kiel la plej grava verko ĝis tiam ankoraŭ ne aperinta. Impona libro ĝi estis, eldonita sur linpapero, pli ol 400-paĝa, sed ĉefe altranga pro la bonega stilo ĉizita tra ĝiaj paĝoj. Ne superflue la verko meritis rekompenco de la Esperantista Akademio, kaj ĝia tiama Prezidanto, S-ro Th. Cart, restis ĝis sia morto sincera admiranto de nia ĵus forpasinta amiko, kiu de sur la kolonoj de tiutempa «Kataluna Esperantisto» ĉiam defendis nian lingvon kontraŭ multaj stilistikaj modismoj, tiutempe svarmantaj tra la esp. gazetaro, ĉar Grau Casas posedis unukorpe tiun lingvan senton, kiun liveras la gramatika konkreco de Esperanto kaj la stiloj de Zamenhof, Kabe kaj Grobowski, same ĉu li uzis la lingvaĵon por esprimi siajn poetikajn pensojn, ĉu por traduki verse aŭ proze. Tial, ne sen merite oni elektis lin, apud la poeto Baghy, kiel Viceprezidanton de la Akademio; per tiuj ambaŭ elektoj, la supera lingva institucio, kvazaŭ senpense, agnoskis por la poezio la aplikon de la fama Cart-diraĵo: **Kio estas klara. Kvankam nekorekta, neniam, estos malbona.** Kaj la poezio de Grau Casas estis klara, purstila, rimplena; kaj ĉiu vorto kaj ĉiu penso elvokas senbambaste la malkaŝan inspiron de la poeto.

En la momento de sia morto, li lasas manskribitaj kelkajn verkojn el kiuj, preskaŭ finpreta, elstaras «Hispana Antologio», kies versaj tradukoj senriproĉe respegulas la originalon. Mi ne volas fini ĉi tiun nekrologon sen esprimo de profunda kondolenco al lia edzino kaj gefiloj, kun la samtempa deziro de eterna kaj paca ripozo por la esperanta trobadoro. La tero estu malpeza al ei, kara Grau-Casas!

EDUARDO CAPDEVILA (Barcelono)

ESPERANTO EN SABADELL

Mi ne volas nun skribi la historion de nia iama tre forta Esperanto-movado, en kiu niaj lokaj pioniroj propagandis pacon kaj amon per tiaj faktoj, kiaj la gasigo de aŭstriaj malfeliĉaj infanoj, post la unua mondmilito. Mi nur raportos pri kelkaj trajtoj de la nun jam organizita Sabadella esperantistaro: Danke al kelkaj viglaj samideanoj, organiziĝis lastjare Esperanto-sekcio ĉe «A. E. Tierra y Mar», kie la iniciatinto S-ro Viladoms gvidis komencan kurson al kvardek gelernantoj.

Antaŭ nelonge, konsiderinte ke tiu sidejo rezultis por ni malgranda, post voĉdono de ĉiuj membroj, oni decidis translokiĝi al grava «Cooperativa La Sabadellense» starigante tie Esperanto-sekcion, laŭ tre

favoraj kondiĉoj. La 5^o de Novembro, post efika propagando per afiŝoj en pluraj montrofenestroj kaj muroj de nia urbo, oni festis la inaŭguron de la kursoj. Ĉeestis pluraj en-kaj eksterurbaj gesamideanoj, el kiuj paroladis la ĉiam freŝa, prezidinto de la Internacia Esperanto-Kongreso de 1909 en Barcelono, S-ro Pujulá Vallés; la kompetenta membro de la Akademio de Esperanto, profesoro Delfi Dalmau; nia parolfacila S-ro Viladoms kaj la Tarrasa entuziasmulo S-ro Chaler. Ĉiujn iliajn paroladojn oni aplaudis probe kaj entuziasme.

Hodiaŭ, do, en Sabadell, morgaŭ en aliaj urboj kaj vilaĝoj, ni, esperantistoj el Hispanio, **semu kaj semu konstante**, kiel iam skribis nia majstro, sed persiste konvencie, ke niaj klopodoj neniam restos vanaj!

VICENTE HERNANDEZ LLUSERA

☆ LA LERNEJO

CONSULTORIO LINGÜÍSTICO

J. P. de VALENCIA.—Encontrará Vd. un sinfin de palabras y modismos que no se pueden traducir literalmente. La palabra **rato** tiene su equivalente en Esperanto en las palabras **mallonga tempo** o **longa tempo**; tambien puede decirse sencillamente **mallonge** o **longe** suprimiendo el **tempo**, porque se sobreentiende cuando se emplea la forma adverbial. Así, **hace mucho tiempo** se traduce por **antau longe**, lo cual es sumamente agradable por su brevedad, y asimismo **poco después** se traduce por **post nelonge**. También puede usarse, con un sentido bastante parecido, la palabra **momento** que en Esperanto es exactamente igual que en castellano. Con gusto le doy a continuación la traducción de las palabras que no encuentra en su diccionario: **pranci** - encabritarse, **grefti** - injertar, **holdo** - bodega (de un buque), **tornistro** - mochila. Procure venir con más frecuencia a nuestras habituales tertulias y le aclararemos de palabra las dudas gramaticales que se le presenten. Hasta entonces, reciba mis afectuosos saludos.

JUAN BOSCH

A LOS INSTRUCTORES DE CURSOS

Con finalidades estadísticas y también para tener una idea del estado de difusión y enseñanza en que se encuentra actualmente el Esperanto en España, rogamos que nos remita a la mayor brevedad un sencillo informe, acerca de los cursos que se estén explicando en el momento presente, con los datos necesarios sobre lugar donde se celebra, profesor, número aproximado de alumnos, nivel de capacitación de los mismos, etc., etc. Así, a partir del próximo número, podremos ya dar algunos detalles precisos sobre este punto tan interesante de la labor docente que es, después de todo, el motivo principal de nuestra razón de ser, como entidad social.

3.ª Internacia ferojista Esperanto - Kongreso

Okazos en Parizo dum Majo 1951.
Ĉiuj interesatoj, kiuj deziras ricevi la programon kaj kondiĉojn de partopreno, petu informilojn al:

Franca Ferojista Esperanto-Asocio

Rue de Milán, 11

PARIS IX (Francio)

ATENTU!

Radio Ròma vokas vin al kunlaboro

Oni akceptas kunlaboradon de la tutmonda esperantistaro. Kompetentuloj en koncernaj fakoj sendu oportunajn kaj vere internaciajn temojn kun interesa enhavo por la ĝenerala publiko.

La tekstoj devas esti maŝinkribitaj kaj ampleksantaj por deklinuta legado. La elektitaj verkoj estos elsendataj indikante la nomon de la aŭtoro.

**Adreso: RADIO ROMA - Via Vittorio Veneto, 56
ROMA (Italiaio)**

ANONCETOJ

Ni akceptas anoncetojn kiuj rilatas al nia afero. Unu peseto au unu r-k. validas por du vortoj. Tri mallongigaj literoj valoras kiel unu vorto. Aparta tarifo por specialaj anoneoj.

DENTEKNIKISTOJ!—S-ro Ricardo de Luna, dez. koresp. pri metiaj k. ĝen. aferoj kun eksterlandanoj. Paseo Colón, 5, 1.º 2.º Barcelona (Hispanio).

Esperanto-Fako de la

Ĥora Societo «Juventud Tarrasense»
San Francisco, 52 **TARRASA (Barcelono)**
dez. ricevi esp-aĵojn, kiel propagandilojn

Por la kongresa libro de la 36-a Universala Kongreso estos akceptataj anoncoj diversspecaj. Perantoj honorariotaj serĉataj.

Anzeigen - Fackler

Weinstr. 4, Munchen 1, (Germanio)

PARA NUESTRO BOLETIN

10.ª lista de donativos (Noviembre 1950)

	Suma anterior	978 Ptas.
Tomás Apráz (Bilbao)	7	»
Salvador Morales (Zaragoza)	6	»
Daniel Iloréns (Valencia)	25	»
Francisco Roglá (Valencia)	5	»
Juan Bosch (Valencia)	10	»
Jaime Juan Forné (Valencia)	5	»
José M.º Bernabeu (Callosa de Segura)	5	»
Miguel Manteca (Riaño)	25	»
Justo Estañ (Granada)	25	»
Pedro Calvo (Valladolid)	5	»
Vicente Peris (Tabernes Valldigna)	10	»
Elsa Wolff (Santa Cruz)	10	»
Málnova Esperantisto (Valencia)	25	»
Fernando Boscá (Valencia)	5	»
Vicente Tena (Castellón)	7	»
José M.º Gil (Grao de Castellón)	5	»
José Selusi (Grao de Castellón)	5	»
Manuel Ruiz (Grao de Castellón)	10	»
Total	1.173	»

[La lista de este mes ya puede servir de modelo!]